

## Babiladaj rondoj

... okazos je la 19-a, vendrede  
**la 13-an de septembro**  
**ĉe Charlotte Blanc Maillard**  
av. Nestlé 7, Vevey  
tél. 021 922 34 74

*~~~~~*  
**la 27-an de septembro**  
**ĉe Marie-Antoinette**  
**et Knud Sunier**  
avenue des Alpes 150, Montreux  
tél. 021 961 38 56

Ne forgesu rigardi kaj aliĝi pere de  
<http://doodle.com/teum7w3gz46vdyc6>



*Sukceso estas iri el malsukcesoj al  
malsukcesoj, sen perdi sian  
entuziasmon.*

Winston Churchill

## Bazaro

\_okazos je la 9-a, sabate  
**la 7-an, la 21-an de sept.**  
**kaj la 5-an de oktobro**  
**La Palud - Lausanne.**

Venu helpi kaj konigi la  
internacian lingvon

Aliĝu pere de  
<http://www.doodle.com/5eaxhdsx4sh8vru4>



### Solvo de la enigmo:

*Le 2 filioj trapasas la riveron. Unu  
revenas sur la unua flanko. La patro  
trapasas la riveron. La filo kiu estas  
sur la dua flanko revenas sur la unua,  
la 2 filioj retrapasas la riveron.  
Do, eblas, sed ... post multe da  
tempo.*

## **Laŭzana Esperanto - Societo**

Poŝtfako - Case postale 246 \* CH - 1000 LAUSANNE 22  
+41 (0)76 411 14 55 \* +41 (0)21 647 29 28  
esperanto@citycable.ch \* [www.esperanto.ch/Lausanne](http://www.esperanto.ch/Lausanne)  
Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Bühlmann \* 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte Blanc  
Maillard \* 079 393 32 63 - Sekr.: Francisko Randin \* 076 411 14 55 -  
Kasistino.: Françoise Pétermann \* 079 517 44 43  
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier \* 021 961 38 56

# Laŭzana Esperanto-Societo

## Informilo

Septembro 2013 - n° 7

La unua kunsido de aŭtuno okazos  
**lunde, la 2-an de septembro 2013,**  
je la 20-a ĉe la unua etaĝo  
de la laŭzana stacidoma bufedo  
**Projekciado de filmoj**  
**de Nandir-Dannir**

**Lunde la 7-an de oktobro**  
*Demandoj kaj gramatikaĵoj pri nia lingvo.*

**Lunde la 4-an de novembro**  
*Decidota*

**Sabate la 14-an de decembro**  
*Zamenhofa festo*



**2014**



**Lunde la 6-an de januaro**  
*Decidota*

# Jara ekskurso de LES



Kiel ĉiujare la membroj de LES eskapas, foje-foje ekstere de sia kantono, por malkovri aliajn horizontojn ! Ĉijare ili foriris por longa vojaĝo al Ĝenevo. La vetero estis tre

bela, kiu ebligis promenadi en la urbo sub la suno. En la stacidomo kelkaj membroj de la Ĝeneva grupo akceptis nin kaj akompanis nin dum la tago. La unua celo estis viziti la botanikan ĝardenon, kiu estas tre fama. Tre afabla kaj kompetenta gvidistino klarigis la nomojn kaj la propraĵojn de la floroj sur nia vojo, kaj kondukis nin al la flordomoj, kie ni malkovris multe da ekzotikaj arboj, kiel palmoj kun bona aŭ venena lakto. Poste ni piknikis en la ĝardeno, sub agrabla pavilono. Estis okazo interŝanĝi agrablajn vortojn inter la membroj de Ĝenevo kaj ni.

Posttagmeze ni piediris al la lago por ŝipi tra la golfeto ĝis la suda bordo. Neantaŭvidita ŝanĝo de la horaro devigis nin atendi longtempe la ŝipon sur la kajo ... feliĉe sub la ombro de ege respektinda platano. Finfine la boato alvenis kaj ni ĝuis la transiradon. Ni busis kaj piediris laŭlonge de la

lago, haltis momenton apud la ŝprucfontano, kie unu el ni rakontis ĝian historion; ni daŭrigis ĝis la memortabulo koncerne L. Zamenhof, piede de la malnova urbo. Anita Altherr, kun granda entuziasmo, prezentis ĝin al ni. Ni dankas kaj gratulas tiun viglan membrinon de Ĝenevo. Ni havis ankoraŭ iomete da tempo por grimpi ĝis la katedralo, kie estis prezentata ekspozicio pri la pendolo de Foucault. Kaj estis ĝusta tempo por trapasi piede la malnovan urbon kaj trovi la stacidomon por trajni hejmen.



La etoso estis tre simpatia kaj varma - kiel la vetero !

Marie- Antoinette kaj Knud Sunier



*En la venonta informilo ni povos legi la prelegon de L. Zamenhof dum la dua kongreso en Ĝenevo (1906).*